

# Sankta Nikolao.

*Věra Podhradská*

Sankta Nikolao naskiĝis en la urbo Patara en roma provinco Azio al kristan-greka familio. Oni opinias, ke tio okazis inter la jaroj 280-286 – eble eĉ 250.

Sankta Nikolao el Myra estis episkopo en Myra en Likli, nun Demre Turkio. Jam dum sia vivo li estis tre populara kaj ŝatata inter la homoj. Li famiĝis kiel donacema homo, ĉefe al tiuj, kiuj la helpon necese bezonis. Kiel eklezia patrono kontraŭ paganismo kaj savanto por maljuste akuzitaj. Pro multaj mirakloj, kiuj okazis je lia intervuo, oni nomas lin ankaŭ Nikolao mirakla kuranto. Temas pri la unua el la plej estimataj sanktuloj el la tuta kristanismo, en orientaj eklezioj estas la dua plej estimata sanktulo – post Maria sankta virgulino.

En okcidenta liturgia tradicio lia nomtago estas la 6-an de decembro kaj pro tio ĉi feston oni kunligas kun disdonado de diversaj donacoj por infanoj (kutime antaŭvespere la 5-an de decembro).

Li inspiriĝis por krei mistikan figuron de Sankta Claus. Sankta Nikolao estis honorigita kiel patrono de maristoj, komercistoj, arkpafistoj, infanoj, apotekistoj, juristoj, studentoj kaj arestitoj. Li estas ankaŭ patrono de ŝtatoj Rusio, Loreno (Lotrinsko) kaj de urboj Amsterdam, Bari, Barranquiela...

Kiel ĉiuj sanktuloj el lia tempo estis Sankta Nikolao el Myra neniam oficiale proklamita kiel sanktulo. Lia respekto fariĝis parto de eklezio, de vasta socia tavolo kaj malrapide disvastiĝis, kaj ĝia plej granda ekspanzo okazis de la 8-a jarcento en Rusio, kies patrono li estas. Iom post ioma tempo ĝia kulto disvastiĝis al aliaj slavaj landoj kaj de la 10-a jarcento en Eŭropon.

En Ĉeĥio kaj ankaŭ en Slovakio nuntempe dum t.n. Nikolaa donac-disdonado, Nikolaon oni prezentas en episkopa vestaĵo kun longa blanka barbo kaj akompanas lin anĝeloj kaj diabloj. Tiu ĉi grupeto vizitas diversajn hejmejajn rondojn kun infanoj la 5-an de decembro antaŭvespere, antaŭ festo de Sankta Nikolao.

Anĝeloj kun Nikolao disdonas donacojn, kaj diabloj prizorgas la simblan punadon kaj timigas friponajn infanojn.

Entute estas Nikolao jam preparo por Kristnasko, kiam oni ne donacas tro valorajn donacojn, sed nur iajn sukeraĵojn, fruktojn aŭ malgrandajn donacojn por feliĉo. Tamen tempo de kiu ekzistas tiu ĉi kutimo, do en tempo, kiam similaj frandaĵoj kun fruktoj estis malpli atingeblaj, tio ĉi estis pli altvalora ol hodiaŭ.

En ĉiuj tempoj en tiu ĉi tradicio temis plej parte pri bela travivaĵo.

Kaj kial oni festas Sanktan Nikolaon jam la 5-an de decembro? Pro tio ke temas pri malnova esprimo de rezisto, kiu jam funkcias preskaŭ 5 jarcentoj. Temas pri rezisto ne kontraŭ superularo, sed kontraŭ progreso. Nome komenci uzadi novan t.n. „meĥanikan tempon“ en jaro 1547. Tiam estis vere revolucia salto por la tuta socio kaj oni ne povas miri, ke multaj homoj kontraŭstaris. Nome ĝis nun la homoj perceptis kaj kalkulis tempon tute alie ol ni nun. - eĉ tago por ili komenciĝis kaj finiĝis tute alie ol ĉe ni kutime. Pro tio estas tiu prokrasto en solenaj tagoj. Kaj kiel do homoj kalkulis tempon de 16-a jarcento. Oni nomas ĝin „vera suna tempo“.

Kaj estas fiksita laŭ incida ombro de suno. En tempoj kiam neniu havis ian ajn horloĝon, orientiĝis sin laŭ tiu ombro. Ombro plej mallonga – tagmezo, kiam suno komencis brili – tagiĝis kiam suno malkaŝis sin, tago finiĝis.

Pro praktikaj kaŭzoj imperiestro Fardinand I Habsburgo fondis t.n. germanan mekanikan tempon. Daŭris pli ol 50 jarojn, tutajn du generaciojn, ol la tempo ekfunkciis.